# la infopmilo


***

## informbulteno pri esperanto

*Bulletin d'information sur l'Espéranto*

ELDONISTO : esperanto-federacio de ORIENTA FRANCIO

*Editeur : Fédération Culturelle de l'Est pour l'Espéranto*
*Maison des Jeunes et de la Culture*
*27, Rue de la République - NANCY -*


*Trimestriel*
Nouvelle Série
N°3
*3ème trimestre 1973*

*Abonnement*
Un an : 5F
le N° : 1,25 F
*(1 jaro : 6 internaciaj respondkuponoj)*


### * AVANT LE GRAND CONGRES MONDIAL SANS INTERPRETES DE BELGRADE

A la date du 13 Avril 1973, 1083 personnes de 37 pays se sont inscrites au 58ème Congrès Universel d'Espéranto, congrès placé sous le haut patronnage du Maréchal *TITO lui-même.* Au cours des discussions préparatoires, il a confié qu'il lisait régulièrement la revue des espérantistes yougoslaves *"Suda Stelo"* ayant appris la langue il y a plus de 40 ans. Avec le docteur *JONAS, Président de la République Autrichienne, TITO* est le second chef d'état en Europe à parler l'espéranto.

### * ENRICO MACIAS CHANTERA en ESPERANTO !

*On savait déjà que le populaire chanteur allemand* Udo JURGENS *préparait un disque où seraient enregistrés en espéranto deux de ses grands succès.*
*Une bonne nouvelle en suscitant une autre, nous apprenons qu'* Enrico MACIAS *vient de confirmer son intention de chanter en langue internationale :* "Je suis fermement décidé à faire ce disque bientôt. L'espéranto est en effet un merveilleux moyen d'expression pour un chanteur dont le plus vif désir est de voir unis *"les enfants de tous pays"* !

### * UN FLASH de RADIO-ROME

Le Secrétaire Général de l'Internationale Socialiste a assuré qu'il porterait au prochain ordre du jour des assises de l'Internationale la proposition de la section italienne, désireuse de résoudre le problème linguistique : cette section soutiendra l'adoption de l'espéranto en vue d'une communication plus facile entre les organisations socialistes des divers pays.

*** UNE NOUVELLE RUE "ESPERANTO"**

*C'est la ville de* GRAY *(Haute-Saône) qui vient officiellement de donner à l'une de ses artères le nom de la langue internationale.*

*** LES ENSEIGNANTS BULGARES ET L'ESPERANTO**

C'est dans près de 100 écoles groupant 2500 élèves que des cours sont régulièrement dispensés. Dans les 4 dernières années près de 600 instituteurs ont participé au cours d'espéranto par correspondance. Rappelons que la Bulgarie a créé un diplôme d'état dont la possession permet de dispenser officiellement un cours public d'espéranto.

*** UN MANUEL D'ESPERANTO à l'USAGE des ISRAELIENS**

*Au cours de l'interview télévisée d'un groupe de jeunes espérantophones israéliens, les téléspectateurs de ce pays ont appris la parution prochaine d'un manuel d'étude par correspondance à l'usage des personnes parlant hébreu.*

*** L'ESPERANTO dans toutes les CABINES TELEPHONIQUES aux PAYS-BAS**

Les instructions destinées aux utilisateurs des appareils sont en effet rédigées dans la plupart des grandes langues mondiales... y compris *l'espéranto*.Rappelons que la firme PHILIPS édite une partie de sa publicité en langue internationale.

*** UNE OEUVRE du GRAND PEDAGOGUE C.FREINET**

**bientôt diffusée sur le PLAN MONDIAL**

*Chacun se souvient du célèbre film* "L'Ecole Buissonnière" *qui fit connaître au grand public l'avènement des Techniques Modernes d'Education Populaire. Un nombre de plus en plus grandissant d'intituteurs et de professeurs adoptent aujourd'hui les conseils et les découvertes de celui qui eut l'ambition* - et y réussit ! - *d'ouvrir l'Ecole sur la Vie. Une de ses oeuvres les plus significatives, "Les dits de Mathieu", est en cours de traduction. Grâce à l'espéranto, ce sera le premier ouvrage pédagogique de cette importance à figurer au catalogue des grandes traductions.*


**3 ouvrages fondamentaux chez votre libraire ....**

| ★ POUR CEUX QUI VEULENT TOUT SAVOIR ! | ★ POUR CEUX QUI ONT DECIDE D'APPRENDRE ! | ★ POUR CEUX QUI PARLENT DEJA ! |
|---|---|---|
| L'ESPERANTO<br>COLLECTION<br>"QUE SAIS JE ?"<br>n° : 1511 | "JE PARLE ESPERANTO"<br>MARABOUT~FLASH<br>n° 345 | petit vocabulaire thématique<br>ESPERANTO - FRANÇAIS ...<br>EDITIONS OPHRYS<br>* |

Tekstojn por la INFORMILO n° 4 vi bonvolu sendi antaù la 20a de septembro al :
Sro J.P. COLNOT - 15, rue de Lavaux - 54520 LAXOU

C E R B U M U ! (dua eldono)

Pasintjare, mi jam invitis vin uzi la pli kvietan someran sezonon por cerbumi, por pensi kiamaniere vi laboros por antaùenigi Esperanton dum la venonta lernjaro. Bedaùrinde, mia alvoko, tiam, atingis vin nur malfrue, septembre...

En la nuna jaro, mi pensas, ke ni devas starigi nian tutan aùtunan agadon sur la bazo de la enketo de UFE, kiu estas tre bona, ne tre longa, do ne teda por la publiko. Sed ĉble vi mem havas alian opinion, alian planon : Tiukaze, bonvolu verki pri tio por la venonta Informilo.

Mi diru denove, ke ĉie, kie troviĝas samidean(in)o kapabla gvidi parolan kurson, tie okazu kurso ! Mi mem organizos nek ekspozicion nek kongreson en la proksima jaro, tial mi povos dediĉi pli da tempo al nia perkoresponda kurso. Kun nun 18 kunlaborantoj, tiu kurso fariĝas grava varbilo sur tuta regiona tereno. Cu necesas diri, ke la perkoresponda kurso neniel celas konkurenci la lokajn parolajn kursojn ! Mi kutimas nun komuniki al la lokaj aktivuloj la leterojn ricevitajn el ilia urbo, kaj tia kunlaborado estis fruktodona en Colmar, bedaùrinde malpli en Strasbourg, malgraù persona letero de Sino GRAMPP al ĉiu informpetinto.

Al ĉiuj, mi deziras tre ripozigajn feriojn, kaj aùtunon aktivan por Esperanto !

J.P. COLNOT

oooooooooooooooooooooooooooo

## - Dua Opinio-sondo pri Esperanto

Ni raportos en la venonta Informilo pri la rezultoj de la opinio-sondo nun finiĝanta. Jam de nun ni povas informi vin ke 2a enketo okazos de la 1a de septembro ĝis 31a de decembro. La demandoj estos la samaj, nur ŝanĝiĝos en la 4a la cifero : 19 departementaj konsilantaroj nun voĉdonis rezolucion favoran al Esperanto (anstataù 13). Kompreneble, se vi havos okazojn enketi antaù septembre, vi rajtas dum la tuta somero demandi viajn najbarojn aù la personojn renkontatajn surstrate...Ĉu utilas ripeti, ke nia fina celo en tiu agado estas ĉefe uzi la okazon de enketo por informi pri Esperanto la demanditajn personojn ? Samtempe, utilos ricevi klaran bildon pri la sinteno de la franca publiko koncerne Esperanton.Sed, ĉefe, provizumu vin per stoko da informfolioj pri Esperanto, kaj informu ! En kelkaj urboj, ĉefe en Strasbourg, oni jam multe laboris sur tiu kampo, sed necesos fari pli por prepari la aùtunajn kursojn.

Enketilo vi povos ricevi petante ilin al nia Sekretario, Sro A. GROSSMANN, Bât.D2, rue de la Doller - 68110 ILLZACH.

En NANCY ni uzas krome la jenajn informfoliojn :

1)- "Soyez tournés vers l'avenir" - prezo po 10 centimoj plus afranko (havebla ĉe UFE, 34, rue de Chabrol - PARIS 10è).
2)- "Moi j'ai choisi", - po 6 centimoj (E.F.E., rue P. Vergnes - 47200 MARMANDE).
3)- "L'Esperanto, la plus jeune des langues", - po 5 centimoj (SAT-AMIKARO, 67, avenue Gambetta - PARIS 20è).

Turnu vin por mendoj al la koncernaj adresoj.

+++++++++

## RAPORTO pri la 32-a Kongreso de la Orient-Franca Federacio okazinta en NANCY la 6-an de majo 1973

Ĉi-jare nia kongreso okazis en la sidejo mem de nia federacio, la centra Junuldomo en NANCY. S-ro COLNOT malfermas la kongreson bonvenigante ĉirkaù 50 ĉeestantojn, kiuj ĵus alvenis, aù jam estis partoprenintaj la sabatan internacian renkontiĝon. Poste li legas kelkajn salut-kartojn, interalie de S-ro JOSSINET, Prézidanto de la Pariza grupo, S-ro Erasmus ZILLES el NEUSTADT/Weinstrasse, Pastro BURKHARDT, kaj S-ro LIENHARDT nia vic-prézidanto.

S-ro GROSSMANN prezentas la agad-raporton de la jaro 1971-72, kiu estis farita fine de la lasta jaro ; ĝi aperis en la Informilo n° 1. S-ro COLNOT aldonas novajn elementojn per ĝis-dataj informoj. Nia membraro por 1972 konsistis fakte el 111 membroj anstataù 108 kiel anoncite, ĉar tre malfrue venis ankoraù kotizoj.

...

Krome ekzistas nur unu oficiala grupo, tiu de Strasbourg. Kvankam estas 12 UFE-membroj en Nancy kaj ĉirkaŭ-urbo, ne estis eble konsistigi el ili firman grupon. Por la jaro 1973 jam pagis kotizon 100 membroj, kaj ni havas 118 abonantojn al nia Informilo (3 el la membroj ne estas abonantoj). Estas varbitaj 28 novaj membroj. La koresponda kurso varbis pli ol 50 lernantojn.

Tiu raporto estas unuanime aprobita.

S-ro COLNOT dank-esprimas al S-ro FEREZ, kiu helpis al ni por aperigi niajn informojn en CONCORDE. Li amplekse prezentas kial ni ne plu havas tiun eblecon kaj kial denove aperas nia bulteno "La Informilo". S-ro FEREZ perdis la agnoskon de "Commission paritaire de Presse", tial li ne plu havas la eblecon favore afranki (kiel periodaĵon) kaj devas ekpagi TVA-imposton por la presado. Do li ne plu povis liveri al niaj membroj ekzemplerojn je 5 F-abono. S-ro COLNOT trovis eblecon presigi nian Informilon en urba junulara Oficejo, je tute favora kosto. Tial denove povas aperi nia bulteno sufiĉe regule. Ni povas esti dankemaj al nia Prezidanto pro la multaj klopodoj, kiujn li **faris**, kaj pro la taŭga solvo kiun li trovis.

S-ro CHAPELLIER prezentas la kas-raporton, kiu montras ke, ni enspezis 526 F kaj elspezis 422,20 F, la profito estas 103,80 F. Lastjare estis en la kaso 795,22 F kaj nun estas 899,02 F. Aparte estis prezentitaj la financoj de La Informilo : 550 F da enspezoj kaj 251,62 da elspezoj por la du unuaj numeroj de ĉi-jaro. Restas do 298,38 F por eldoni la du lastajn numerojn de La Informilo.

La raporto estas unuanime aprobita.

Poste raportas kelkaj aktivuloj pri la agado en sia urbo. S-ino GRAMPP salutas je la nomo de la Strasburga grupo, kiu konsistas el 41 membroj. S-ro BERGEROT raportas pri Epinal ; S-ro P.DENIS pri Bar-le-Duc, S-ro Cuéné pri COLMAR, S-ro GROSSMANN pri Mulhouse, kaj Saint-Louis. S-ro ZIPFEL mencias, ke en Strasbourg ne-esperanta asocio "L'Union des Femmes Civiques et Sociales" mem propagandas Esperanton kaj organizas kursojn kun sukceso S-ro COLNOT ankaŭ raportas pri Nancy kaj pri la koresponda kurso de nia federacio.

Poste, la kongreso renovigas triono de la komitato. S-roj Richerâteaux kaj Wermelinger ne rekandidatiĝas. Estas petitaj novaj kandidatoj, sin prezentas S-ro Cuéné kaj S-ro Zipfel, kiuj estas elektitaj kiel novaj kandidatoj. Estas reelektitaj S-roj Colnot kaj Durand, ĉiuj unuanime.

La kongreso pridiskutas la naciajn punktojn. Diversaj membroj konsideras ke la kas-raporto prezentita en F.E. estas tro longa kaj komplika por ne-fakuloj,tial ĝi malsparigas paĝojn en F.E. Prefere aperu nur resuma raporto en F.E., sed UFE disponigu por ĉiu Federacio kaj por fakuloj interesiĝantaj detalan stencilitan raporton. Sed oni aprobas la nunan agadon de UFE kaj gratulas pro la ekvilibra budĝeto. Tia-sence estas farita rezolucio por la nacia kongreso en Luksemburgo. S-ro Pol DENIS estos tie nia delegito.

La voĉdonado por la diversaj raportoj de UFE okazas skribe (eĉ koresponde por iuj). La rezultoj estas jenaj :

| | | | |
|---|---|---|---|
| 1e) - Agad-raporto | jès : 24 | ne : 1 | sindeteno : 2 |
| 2è)-Financa raporto | jès : 24 | ne : 1 | sindeteno : 2 |
| 3e)-Buĝeto 72-73 : | jes : 25 | ne : 1 | sindeteno : 1 |
| 4e)-Akiro de la sidejo : | jes: 26 | ne : 0 | sindeteno : 1 |

La voĉdonado por la elekto de la UFE-komitatanoj same okazas, la rezultoj estas transdonitaj al UFE.

Post la komuna tagmanĝo, la nova komitato kunvenas por elekti sian estraron. La antaŭa estraro estas reelektita.

La urbo de la venonta kongreso ankoraŭ ne estas decidita.

A. GROSSMANN.

Noto de la Prezidanto - Ĉu ni precizigu ke niaj financoj estis en ekvilibro ĉi-jare dank'al donacoj kiuj sumas preskaŭ 200 F (i.a. S-ro BERGEROT malavare donacis 152 F). Kaj La Informilo povis aperi dank'al kunlaborado de Sro GROSSMANN por kolektado de tekstoj, Fino JACQUOT por tajpado, Sro CHAPELLIER por dissendo, kaj de nun de Sro DENIS por ofseto de la 1a paĝo.

-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-

Samideanoj el Strasburgo rakontas iom pri la Orient-Franca Kongreso en Nancy.

Ni estis la unuaj Esperantistoj kiuj enskribiĝis en la registro de la Junuldomo. Iom poste alvenis gesamideanoj el Belgujo ; amikaj salutoj, interkonatiĝo kaj ni foriris por malgranda promenado en la urbo. Je la vespermanĝo ni estis ses samideanoj ĉar kuniĝis kun ni Sro Colnot kaj lernanto lia. Post la manĝo Sro Colnot prezentis diapozitivojn faritajn de li dumferioj en Svisujo. Ni disiĝis sufiĉe malfrue en la nokto.

La junuldomo estas tre vasta moderna konstruaĵo, 7-etaĝa, kaj posedas ĉirkaŭ 200 ĉambrojn. La ĉambroj, ĉefe destinitaj al junuloj, estas agrablaj, helaj, komfortaj, kvankam sobre meblitaj. Precipe la litoj estas iomete mallarĝaj sed feliĉe malaltaj, ĉar dum la nokto mi subite vekiĝis kaj retroviĝis tere, sen doloro, mi aldonas. Iom post iom novaj samideanoj alvenis.

Dum la mateno sabaté, ni vizitis aŭtomobile la ĉirkaŭaĵon, interalie la kvartalon nomitan Haut-du-Lièvre, la altan loĝturon de Nancy (29 etaĝoj)starantan sur monteto. Blovis tre forta printempa vento. Sro Colnot estis nia gvidanto, liaj klarigoj estis interesaj kaj tre rapide la mateno forpasis.

Por la tagmanĝo ni bezonis jam plurajn tablojn por loki ĉiujn, kiuj intertempe estis alvenintaj. La manĝo bongustis, estis abunda kaj malmultekosta. Lerta servistino alportis, forprenis kiel ĵonglisto, ĉu la malplenajn telerojn, ĉu la plenajn pladojn, kaj ĉiufoje amuzaj aŭ afablaj vortoj akompanis ŝiajn farojn

Posttagmeze alia promenado kondukis nin al Historia Muzeo"EGlise des Cordeliers", "Porte de la Craffe", tra la malnova parto de la urbo. Nia gvidistino ne parolis Esperanton. La klarigoj estis diritaj franclingve, ankaŭ en perfekta germana lingvo. Jes, en germana lingvo ĉar du samideanoj el Mannheim (Germanio) partoprenis la kongreson. Ankoraŭ bongusta vespermanĝo atendis nin kaj denove pluan tablon la Esperantistoj uzis.

Ankoraŭ pli grandan salonon ni devis okupi por admiri la belan dia-projekciadon kies titolo estis "Djerba Oazo en la maro". La varma suno sur Insulo Djerba, kiun montris al ni Sino OEHRI, forigis la malbonan impreson de la pluvo kiu falis posttagmeze, dum la vizito de la urbo. La okuloj ankoraŭ plenaj je la belegaj bildoj sed ankaŭ sufiĉe lacaj ni trapasis nian duan nokton en Nancy.

Dimanĉe matene

Estis nun tempo por pensi al seriozaj aferoj.La laborkunsido komencis je la naŭa kaj flue pasis ; mi lasas al aliaj la taskon paroli pri ĝi. Mi nur volas mencii ke ni estis certe bona kvardeko kiu atenteme aŭskultis la traktitajn variajn temojn.

Post la kunsido la Prezidanto de la junuldomo oferis al ni la honorvinon.Sro COLNOT faris tre bonan paroladon Esperantlingve kun tuja traduko franclingven, ĉar la Estro de la junuldomo bedaŭrinde ne estis Esperantisto ! Post kelkaj reciprokaj dankemaj vortoj ĉiuj levis sian glason por "tosti" al la junuldomestro kiu permesis tiun renkontiĝon en sia loko kaj al Esperanto por ke ĝi vivu kaj vivos pli kaj pli en la estonteco. Tiu ceremonio fermis la Kongreson mem.

Lastan fojon la Esperantistoj retroviĝis en la manĝoĉambro. La vino helpanta, la etoso iĝis gaja kaj la ĝojo brilis sur ĉiuj vizaĝoj. Kelkaj samideanoj jam devis hejmenveturi, aliaj profitis por rapidi al "Place Stanislas" kaj foti la faman lokon.

Je la tria horo ni havis la plezuron vidi aliajn sunplenajn diapozitivojn, kiuj estis prezentitaj de Sino OEHRI ; kune ni ekskursis ĝis la Orientaj limoj de la Saharo.

Sed la ĉeestantaro pli kaj pli malgrandiĝis. Unu post la alia adiaŭis kaj promesis revidon, ĉu ĉe La Hingrie, ĉu al Kongreso en Luksemburgo kaj eĉ iuj rendevuis por la Universala Kongreso en Jugoslavio. La eta grupo kiu nun restis retroviĝis por lasta promenadeto en parko Ste-Marie kaj poste en urba-restoracio.

Tiel finiĝis tiu simpatia kongreso.

B. GRAMPP.

-:-:-:-:-:-:-:-

EKZAMENO

Sukcesis en la 1a ekzameno en Nancy, la 6an de majo :

Sro POLMARD Pierre, Sro POLMARD Vincent(filo),Fino POLMARD Marie, Sro VANOLA Jean-Luc (ĉiuj el Bar-le-Duc) - Dro VOLTZ Jean, Sino GEOFFROY Evelyne, Sro POURCHER François (ĉiuj el Epinal) - kaj S-ino MEYER Berthe el Breitenbach (Ht-Rhin).

Gratulojn al ĉiuj.

F. ZIPFEL.

...

EN NANCY

La ekspozicio "La libro Esperanto" okazis en la Centra Junuldomo de la 19-a ĝis la 23-a de oktobro. Ĝi estis relative sukcesa :125 vizitantoj, el kiuj 25 Esperantistoj. Similaj aranĝoj en la Junuldomo, kiu situas ĉe strato aparte kvieta, eĉ dezerta dimanĉe, ne estis pli sukcesaj. Por anonci la ekspozicion, kaj poste por anonci la kursojn, ni okazigis afiŝ-kampanjon, por kiu ni uzis ĉirkaŭ 200 afiŝojn. Ni disdonis 1400 programojn, kaj 1500 diversaj flug-foliojn. Tri komunikoj kaj 7-minuta intervjuo estis dissendataj de la regiona radio-stacio. Ni liveris al la loka gazetaro 17 komunikojn. Dum la ekspozicio, okazis dimanĉe esperanto-renkontiĝo regiona, kiun partoprenis ĉirkaŭ 25 personoj, kaj 20 komune tagmanĝis. La ĉefa rezulto estis eble ke ĉiuj partoprenintoj plene konsciis pri la alt-valora ilo por renkontiĝoj, staĝoj kaj kongresoj, kiun ni ĉi-tie havas je nia dispono.

Ni malfermis 2 kursojn tuj post la ekspozicio, la 26-an de oktobro : ili okazis ĵaude, la 1a je la 18-a 45 kun 2 lernantinoj, la 2-a je la 20-a30 kun 12 gelernantoj. (Du aliaj planitaj kursoj (en Beauregard kaj en Tomblaine) fiaskis, neniu interesiĝis.

Kunvenoj okazis anstataŭ kursoj, la 2-an ĵaŭdon de ĉiu monato. Memore al D-ro Zamenhof ni projekciis lum-bildojn la 14-an de decembro.

Koresponda kurso : de post oktobro, ni sendis 31 komunikojn al la regiona gazetaro, respondis al 170 informpetoj, kaj enskribis pli ol 50 novajn lernantojn. De la pasinta somero fin-lernis la kurson :F-ino Françoise Renoncé en Metz(57) gvidita de S-ro Manceau; F-ino Catherine Kuntz en Rixheim (68) gvidita de S-ro Grossmann ; S-ro Daniel Christy en Bretteville-sur-Odon (14) gvidita de S-ro Pol Denis; F-ino Beby HOPP en Esch-sur-Alzette (Luksemburgo) gvidita de F-ino Jacquot ; S-ro Michel JOSSET en Le Grand-Quevilly (76) kaj S-ro Jean-Pierre Cousin en 92-Rueil-Malmaison, ambaŭ gviditaj de Sro Etienne (54-Malzeville); S-ro Philbert en Illkirch Graffenstaden -(67), gvidita de S-ro Zipfel post lernado dum 2 monatoj kaj duono; kaj fine, S-ino Louterbach en Echery (68) SAINTE-MARIE-AUX-MINES, gvidita de S-ro Klotz (Nancy).

En Nancy mem, la kursoj ĉesis funkcii glate de post decembro, mi restarigis la kurson de la 20a30 la lundojn (anstataŭ ĵaude), kun principe nur 5 lernantoj el 12, plus 2 novuloj, komence de februaro. Tamen, la afero tute lamas, ne ĉeestas pli ol 3 lernantoj samtempe kaj la sekvantan semajnon denove 2 aŭ 3, sed ne la samaj !

Ni sukcesis tiel lerni nur 10 lecionojn de la Junulkurso en 20 semajnoj.

J.P. COLNOT.

==============

Familieca renkontiĝo en La Hingrie

Ĝi okazis, kiel anoncité, la 26-27ajn de majo. Belega vetero, ripoziga pejzaĝo, gajaj kantoj, amikeca etoso. Ceestis entute 18 personoj, ĉar verŝajne, pro la "festo de la patrinoj" multaj ne venis.

Se vi ne venis, pentu kaj promesu al vi ĝui tiun renkontiĝon venontjare !

J.P.C

-:-:-:-:-:-:-:-

Antaŭ-anonco

Baldaŭ aperos nov-speca libro :

"AMUZAJ DIALOGOJ EN ESPERANTO"

kiun verkis nia s-ano A.LIENHARDT por faciligi al novuloj lerni paroli la universalan inter-lingvon Esperanto.

Ĝi enhavas pli ol 2.000 (du mil) konversaciajn frazojn, kutimajn parol-turnojn, didaktikajn demandojn kaj respondojn, kiuj ebligas al Esperanto-lernantoj praktike ekzerci sin en parolado.

La pariza artisto (kaj s-ano) ARFOLL desegnis 21 tut-paĝajn ilustraĵojn por tiu instrua kaj amuza libro, kiu certe utilos kaj plaĉos al multaj el niaj gelegantoj.

Pluaj informoj aperos ĝusta-tempe.

-=-=-=-=-=-=-=-

Le Directeur de la publication : J.P.COLNOT - Imprimé par l'OMJ, 20,quai Claude Le Lorrain - NANCY - N° dépôt légal 245.